

ELDONANTOJ:
 D-ro L. Zamenhof, Warszawa (Varsovio).
 W. M. Page, adv., Edinburgh.
 E. Archdeacon, Paris.
 Joan Gili Norta, Barcelona.
 Teo Jung, Köln (Kolonjo).
 G. van Heek, Hengelo.
 Frans Schoofs, Antwerpen.
 P. v. Medem, bankdirektoro, Kaunas (Kovno).
 Ĉef-redaktoro: Teo Jung.
 Kun-redaktoro: M. Butin.
 Literatura redaktoro: Zanoni.

ESPERANTO

TRIUMFANTA

ADMINISTREJO
 Köln-Horrem, Rejnlando, Germanio.
 Poŝtĉeka konto Köln 70865, por Teo Jung, Köln-Horrem.
 Manuskriptojn oni skribu nur sur unu flanko de la papero. Skribu ĉion legeble, se eble per maŝino. Por resendo aŭ respondo aŭ aldonu, resp. kup. aŭ poŝtmk. Adresu ĉion al s-o Teo Jung, Köln-Horrem, Germanio.

ABONEJOJ

ekzistas en multaj landoj. Vidu la liston de la Abonejoj sur la anonca pago. — En multaj lokoj ET estas poekzemplere acetebila ĉe stacidomoj kaj aliaj publikaj gazet- kaj libro-vendejoj kaj en grupoj. Dum vojaĝo oni postulu ET en ĉiu ŝtacidoma gazet-vendejo, hotelo, kafejo kaj restoracio.
 Komercal ĉambroj favoraj al Esperanto abonas ET senpage ĉe la administrejo per oficiala letero. — Bibliotekoj, legejoj, redakcioj, aŭtoritatuloj (ne-Esperantistaj) povas ricevi ET pro propagandaj celoj por la duono de la abonprezo.

Aperas semajne.

3 dolaroj, 7.50 guldenoj, 12 svedaj kronoj, 15 svisaj frankoj, 15 ŝilingoj, 15 danaj aŭ norvegaj kronoj, 15 pesetoj, 25 francaj aŭ belgaj frankoj, 35 liroj, 60 francaj markoj, 75-ĉal. kronoj, 360 hung. kronoj, 1200 aŭstr. kronoj, 1600 pol. markoj. — Ĉiu pagas en la valuto de sia propra lando per naciaj bankbiletoj en rekomendita letero, aŭ per germanaj bankbiletoj aŭ ĉekoj sur germanaj bankoj laŭ la taga kurzo. — Balkanaj kaj baltaj ŝtatoj pagu duonjare 50 gmk., Rusio 40 gmk. Aliaj landoj pagu per dolaroj aŭ ŝilingoj, aŭ 100 respond-kuponoj aŭ 400 germanaj markoj. — Ne estas necese pagi tutan jarabonon je unu fojo. Oni sendu laŭvole altan sumon, kaj ni liveros tiom da numeroj, por kiom valoras la pago. Abonantoj, kies abono estas finiĝanta, ricevas ĝustatempe admonilon. — Abonoj povas esti komencataj per iu ajn numero. — Germanoj abonu ĉe la poŝto (Postzeitungsliste, 13. Nachtrag, Ergänzungsheft 3, paĝo 280, sub „Kunstsprachen“), kvaronjare 21 mk., aŭ rekte ĉe la administrejo Köln-Horrem, Germanio (ĉiu numero banderolita 2,— mk.).

JARABONO:

Aperas semajne.

ANONCOJ

kostas po cm² (kvadracentimetro) por ĉiuj landoj 3 gmk., ĉe grandaj aŭ ripetataj anoncoj granda rabato. — ANONCOJ kostas po 2 foja enpresoj kaj po 25 vortoj por bonvalutaj landoj (ankaŭ Italio kaj Finnlando) la prezon de 4 n-oj de ET (1 jar-abono aŭ 4 stampitaj respond-kuponoj); por malbonvalutaj landoj la prezon de 6 n-oj de ET (1 jar-abono); 1 foja enpresoj kostas la samon kiel 2 foja; ĉe rektaj abonantoj ni deprecas la pagon por anoncoj de la abonkonto. — Familiaj anoncoj (naskiĝo, fianĉiĝo ktp.) kaj anoncoj pri gravaj esp. okazintoj (ĉefkunido, fondiĝfesto ktp.) estas unufoje enpresataj senpage.

Numero 68 :-: Edinburgh, Paris, Barcelona, Köln, Hengelo, Antwerpen, Warszawa, Kaunas :-: 22. Jan. 1922.

Universala Esperanto Asocio.

(Sidejo: Genève, Svis., 12 Boulevard du Théâtre.)

Por ĉiu serioza Esperantisto, kiu rigardas Esperanton ne nur kiel ludilon, kiel amuzojn, kiel agrablajn tempopasigilojn, sed kiel gravan kulturideon, kiel praktikan interkomprenilon inter diverslingvanoj, kiel nepran necesajon de nia tempo, — por ĉiu serioza Esperantisto, ni ripetas, la Esperanta movado hodiaŭ ne estas pensebla sen Universala Esperanto Asocio; apenaŭ li povas imagi, ke iam la Esperantistoj povis internacie agadi sen UEA.

Sed konfesante la pravecon de tiu ĉi fakto kaj komparante samtempe la relative malgrandan nombron de membroj de UEA (malpli ol 5000) kun la nombro de nuntempe vivantaj Esperantistoj, oni devas bedaŭrinde konstati, ke la nombro de la seriozaj Esperantistoj do estas nur tre malgranda.

La plimulto de la nun vivantaj Esperantistoj partoprenis kurson, aliĝis al sia loka grupo, kies kunsidojn ili vizitas kelkfoje, aŭ eĉ tute ne organiziĝis timante elspezi kelkajn frankojn, markojn, ŝilingojn aŭ kronojn por la „granda ideo“, pri kies valoro tamen ili estas plene konvinkitaj. Sed la nura konvinko pri la „granda ideo“ ne sufiĉas; se oni estas konvinkita pri la kulturvaloro de tiu ideo kaj se oni deziras, ke tiu ĉi ideo venku, oni devas ankaŭ esti preta iom labori kaj doni por ĝi, kaj — antaŭ ĉio — oni devas mem praktiki ĝin. Alie estas preferinde tute forlasi la ideon kaj serĉi malpli idealan, malpli postuleman kaj pli facile plenumeblian okupon.

Multaj homoj oferis sian tutan havajon, sian tutan liberan tempon, sian sanon, eĉ sian vivon por sia idealo, ili fariĝis martiroj por sia idealo: ĝi estu la religio, la nacio, la libereco, la scienco aŭ io alia. Tio ĉi ĝenerale ja ne postulas de la Esperantisto, kvankam ankaŭ inter ili ekzistas „martiroj“, kiuj sin oferas — en la plena senco de la vorto — por la ideo de lingvo internacia. Sed oni rajtas postuli, ke la Esperantistoj disponigu almenaŭ tiom da laboro, tempo kaj mono por siaj necesaj propagandaj kaj precipe internaciaj organizaĵoj kaj gazetoj, kiom ĉi tiuj bezonas por sia ekzistado kaj por ke ili povu almenaŭ iel impresi la publikon.

Por sia bona kaj sendanĝera ekzistado UEA bezonus 10 000 membrojn, kaj por ke ĝi povu impresi la publikon, ĝi bezonus 20 000 aŭ eĉ pli. La unua nombro estus jam nun tute atingebla, la dua estus atingebla post mallonga tempo, — se la Esperantistoj ĝenerale estus pli seriozaj, pli profunde tustitaj de la kulturgraveco de lingvo internacia, kaj se ili mem pli ofte, pli multe kaj pli intense praktikus ĝin.

La okazoj por la praktikado de Esperanto estas sufiĉaj, oni devas nur malfermi la okulojn, oni devas voli vidi: la grupoj, la ligaj kunsidoj, naciaj kaj internaciaj kongresoj, la korespondado (kompreneble nur pri seriozaj aferoj, alie ĝi estas senvalora por la movado), la vojaĝado, internaciaj servoj, perado de komercaĵoj, kunlaboro ĉe Esp. gazetoj, ktp. Ne ĉio taŭgas por ĉiu; sed kiu volas, jam trovos tion, kio taŭgas speciale por li. Kaj ĝuste la membreco al UEA prezentas tiom da okazoj por praktiki Esperanton, tiom da avantaĝoj por ĉiu serioza Esperantisto, ke estas tute nekompreneble, kiel malmultaj Esperantistoj ekkonas la valoron de UEA. Ni eĉ riskas aserti, ke tiu Esperantisto, kiu unufoje aliĝis al UEA kaj efektive uzas ĝiajn servojn, restos sindona Esperantisto dum sia tuta vivo, ke oni ne bezonas timi pri lia fideleco al nia movado.

Tial ni admonas ĉiujn gesamideanojn, kiuj volas esti rigardataj kiel seriozaj Esperantistoj sed ankoraŭ ne estas membroj de UEA, tuj aliĝi por la jaro 1922, kaj tiujn, kiuj jam estas membroj, ni alvokas varbi inter siaj konatoj, en sia grupo, ĉe siaj korespondantoj, por ke UEA kresku kaj fortiĝu en tia grado, kiu respondas al la disvastiĝo kaj forto de nia movado.

Ni ne opinias necese hodiaŭ doni resumon pri la historio aŭ pri la nuntempa organizo de UEA.



D-ro Edmond Privat
Viceprezidanto de UEA.



S-o Ed. Stettler
Prezidanto de UEA.



S-o Hans Jakob
Ĝenerala Sekretario de UEA.

La nuna Gvidantaro de UEA.

Pri tio ni publikigos eble alian fojon specialan artikolon. Ni nur atentigas ankoraŭ je la ilustraĵoj en hodiaŭa numero, por kiuj la Centra Oficejo de UEA bonvolis disponigi al ni la fotografiaĵojn. Ili montras la nunan gvidantaron de UEA: la prezidanton s-on Ed. Stettler, vicprezidanton d-ron Edmond Privat, Akademiano, redaktoron de „Esperanto“, ĝen. sekretarion s-on Hans Jakob, — plue la redaktejon, administrejon kaj parton el la biblioteko, reprezenteme sed praktike kaj laŭcele aranĝitajn.

La Jarlibro de UEA

devus esti la „Vademecum“ (Migru-kun-mi) de ĉiu Esperantisto. Pli praktika libro por la Esperantisto ne ekzistas. Ĉiu membro de UEA ricevas ĝin senpage. La jarlibro por 1921 enhavis sur pli ol 200 paĝoj en plaĉa porpoŝa formo antaŭparolon de la ĝenerala sekretario, ĝeneralan kalendaron, specialajn hebrea kaj mahometanan kalendarojn, diversajn tabelojn pri monunuoj kaj afranko, notindajn datojn el la historio de Esperanto kaj de UEA, adresaron de la Esp. organizaĵoj naciaj kaj lokaj, de la Esp. gazetoj, ktp., plue la statuton de UEA, notojn pri la organizo de UEA kaj adresaron de la delegitoj kaj vicdelegitoj de UEA kaj de la Esp. grupoj en la tuta mondo, adresaron de korespondemuloj (senpaga enpresoj por membroj de UEA) kaj ampleksan anoncan parton. Do la nura ricevo de la praktikega jarlibro jam valoras la kotizon al UEA.

Malfermu viajn okulojn!

La terura milito antaŭ nelonge finiĝinta donis al la mondo la plej trafaĵan pruvon pri la neceseco de profunda kaj nepra solidareco inter ĉiuj nacioj: eĉ la venkintoj, eĉ la neŭtraluloj pli malpli suferas pro la konsekvencoj de la milito, kaj la ĉiulandaj civitanoj — aparte konsultiĝe — unuanime juras, ke ili ne plu volas iun ajn militon.

Tamen, la faktoj montras al ni, ke la estraroj de la nacioj povus ankoraŭ, eble jam morgaŭ, ieti la homaron en novan militon, kiu verŝajne estus ankoraŭ pli terura ol la pasinta.

Do kiamaniere, oni povas esperi, ke la civitanoj ĉie malhelpos decideme novan interbucadon? Kiam ili intime kaj persone interkonatiĝos kaj konstatos, ke — kiel individuoj — ili tute ne konas la nacieman malamon. Kiam oni definitive

forigos la absurdajn limpostajn barilojn, kiam — konsekvence la aferoj ĉiunaciaj estos tiel intermiksitaj, ke la duono de la civitanoj de unu nacio estos kreditinto al la duono de la alia kaj reciproke, tiam Esperanto estos nediskutebla la plej certa rimedo por atingi tiun rezultaton. Tio ĉi, ke nenla politika motivo povos je ajn kontraŭstari la alprenon de tiu ĉi rimedo.

Alia terura kaŭzo de malamo kaj venĝemo inter du najbaraj nacioj estas, ke la venkinta nacio ĉiam volis, ĝis nun, altrudi sian lingvon al la venkita nacio en la konkera teritorio. Kvankam tia deĉido povas iel ŝajni tirana, alparte ĝi estas lomo ekskuzebila, ĉar oni povas preteksti, ke la alprenado de ununura lingvo en unu lando estas preskaŭ necesa por la plej bona komprenebleco inter ĉiuj samlandanoj.

Ĉu ne estas evidente, ke la iama Aŭstrujo estus havinta multe pli grandan forliikecon, se — flanke de la 17 malsamaj lingvoj parolitaj sur ĝia teritorio antaŭ ĝia dismembrigo — ĝi estus ĝinta komunan intersangan lingvon? Ĉu ne estas evidente, ke la malgranda aŭ malforta nacioj havas specialan intereson por la ĝenerala alprenado de universala neŭtrala lingvo? Ĝi estos efektive grandega helpo por ilia ekonomia, politika, lingva kaj literatura sendependeco kontraŭ la aliaj pli potencaj najbaraj nacioj. Samtempe ĝi alportos al ili netakseblan helpon kaj faciligon por la komercaj interrilatoj. Do, se la grandaj aŭ potencaj nacioj rifuzas subteni Esperanton pro la (kaŝita aŭ nekaŝita) espero altrudi sian lingvon al la mondo, des pli grava estas la motivo, por ke la malgranda aŭ malfortaj nacioj subtenu Esperanton. Cetere la alprenado de unu vivanta nacia lingvo kiel internacia estus tute nepravigebla favoraĵo kaj ununura profito por unu nacio, kaj estas tute ĵuste, ke la aliaj nacioj energiege kontraŭstaru tiun planon.

Do, ĉiuj malgranda aŭ malfortaj nacioj devus, evidente, sin interligi kaj starigi la devigan instruadon de Esperanto en siaj lernejoj. Tiamaniere ili konstruus tiel grandan forton, ke — vole nevole — ĉiuj nacioj estos devigitaj ilin sekvi. Cetere, ŝajnas al mi — laŭ mia informoj — ke nun Esperanto estas jam pli favorata ĉe la malgranda kaj malfortaj nacioj.

Estas dezirindege, ke ĉiuj pli kaj pli komprenu tiun necesecon kaj klopodu laŭ tiu vidpunkto. Tiam ni povos baldaŭ, per ilia helpo, altrudi al la homaro Esperanton, kiun ĝis nun ĝi tiel obstine kontraŭstaras (malprofiĝe al al mem),

ĉar ĝi estas, ne neigebila, la plej sensacia progreso iam konita ĝis nun sur nia malfeliĉa planedo

Ernest Archdeacon.

(Rim. de Red.: La ideoj de s-o A., esprimitaj en ĉi-supra artikolo, estas certe tiel ĝustaj kaj ĵustaj kaj iam pli ol unufoje pridiskultitaj, bedaŭrinde sen granda sukceso. Tamen la Esperantistaro ne ĉesu propagandi tiujn ĉi ideojn, precipe la Esperantistoj de malgranda kaj malforta nacio ĉiam denove montru al siaj samlandanoj la utilecon de Esperanto por iliaj interesoj. — La represo de ĉi-supra artikolo en aliaj Esp. gazetoj kaj ĝia traduko kaj represo en naciaj ĵurnaloj estas dezirinda.)

La universala ekspozicio de 1930 en Bruselo kaj la internacia urbo.

La „Unuiĝo de la Internaciaj Asocioj“ sendis al la belga registaro projekton pri kombino de la Brusela Ekspozicio en 1930, okaze de la centjara datreveno de la nacia sendependeco, kun ekspozicio de daŭra Urbo Internacia.

La raporto, prezentita de s-o Paul Oilet, priskribas la historion de la universalaj ekspozicioj. Li montras, kiel la projekto estas natura sekvo de ilia antaŭa disvastiĝo kaj de tiu de la antaŭ nelonge restarigitaj foiroj. Aliflanke, la 168 internaciaj kongresoj konvenintaj en la nura jaro 1921 estas pruvoj pri la multobliĝo de la internaciaj rilatoj de post la milito. Rimedoj devas esti disponigataj al la grandaj tutmondaj interesoj organizitaj kaj al la institucioj de la ekonomia kaj intelekta vivo, por starigi fiksan kaj seninterrompan Centron. Tiel ili povus efike kaj kunordigite agi en kaj influi sur la gravaj homaraj demandoj.

La unua internacia ekspozicio okazis en la Kristala Palaco en Londono dum la jaro 1851. La dua havis lokon en Parizo en la Palaco de l'Industrio en 1855 kaj kunigis 24 000 ekspozantojn. De tiu momento la institucio estis fondita, kaj laŭvice organiziĝis samspecaj ekspozicioj en Vieno, Nov-Jorko, eĉ en Aŭstralio.

Iom post iom ilia graveco iĝis pli granda. En 1867 la ekspozicio de Parizo havis 42 000 ekspozantojn, kaj Parizo estis dum multaj monatoj iu Babilono, kiun la reĝoj vizitis unu post la alia. En 1878 la nombro de la elmontrantoj estas 53 000 kaj tiu de la vizitantoj 12 000 000. En 1900 oni atingas la nombron de 60 000 partoprenantoj.

La proksima ekspozicio ne plu devus esti neplena, irorapida, provizora ellaborado, kun celo preskaŭ nur komerca, sed ĝi devus esti sintezo zorge kunordigita de la Universala Progreso, cedonta ĝustan lokon al la scienco, al la arto, al la socia organizado, same kiel al la ekonomia vivo.

Sed kiel realigi tiun ideon? Kiel formi tiun urbon? Laŭ la raportinto, ĝi estus la kunliga centro de ĉiuj grandaj movadoj de la tutmonda vivo. Laŭ intelekta kaj scienca vidpunkto tiu centro ludus konsiderindan rolon en la mondo, kaj Belglando ludus la rolon, kiu ŝajnas esti antaŭdestinita al ĝi; laŭ ĝia sinteco kaj laŭ la hazardo de ĝia geografia situacio ĝi iĝus la granda krucvojo, kie renkontiĝus la diversaj ideoj de la mondo, kie la intelekta vivo kunfluus, de kie elsprucus varma kaj hela radiaro sur la tutan homaron.

Oni tuj komprenas, kiam grandan progreson prezentus tiu projekto, se ĝi estus zorge studata kaj realigata. La ekspozicio estus sintezo perfekta kaj vivanta de la universala progresado, tia kia ĝi estos karakterizata en la unuaj jaroj de la rekonstruo de l'mondo post la granda milito, ĝi estus modela urbo kaj memoriga monumento de la klopodego de ĉiuj popoloj. Tiel konceptita, la Brusela Ekspozicio de 1930 povus havigi al si tute novajn karakterizaĵojn, ĝis nun nekonatajn.

(Traduko kaj represo de tiu ĉi artikolo estas rekomendinda.)

Se vi ankoraŭ ne estas membro de Universala Esperanto Asocio, ne hezitu kaj tuj membriĝu!

Propono por nova maniero de propagando.

Reflektoj kaj ko. kludoj de prof. J. Šušter en Saaz (Ĉeĥoslovakio).

Se ni superrigardas la tutmondan Esperanto-movadon, kia ĝi pentriĝas en la Esperanta gazetaro, ĝi prezentas al ni la jenan bildon: Ĉie, kie montriĝas tiel nomata Esperanto-movado, ĝi estas en la manoj de unu aŭ kelkaj entuziasmoj, kiuj ĉiunmaniere klopodas instigi kiel eble plej multajn homojn al lernado de nia lingvo. Oni ja ne povas diri, ke liaj klopodoj ne havas sukceson; ĉar ĉie, kie propagandas tia entuziasmo, estas de tempo al tempo malfarmataj kursoj, per kiuj oni celas alkonduki al nia movado novajn anojn. Sed preskaŭ nenie kaj neniam la finukceso respondas al la oferitaj penadoj: nekalkule, ke multaj kursanoj ne finvizitas la kursojn, ankaŭ tiuj, kiuj finlernas la lingvon, ne restas fidele al nia movado.

La kaŭzo de tiu ĉi malgola aĵo estas evidenta: preskaŭ ĉiuj kursvizitantoj konsideras la lernadon de la lingvo pli malpli kiel amuzojn, amatorajn, kiun ili flankenmetas, kiam ĝi komencas perdi la ĉarmon de la noveco. La ĉefdomaĝo estas: nia lingvo ankoraŭ ne sufiĉe enpenetris en la pulsantan praktikan vivon. Se la propagandisto al la publiko kaj la kursgvidanto al la lernantoj povus montri, ke la scipovo de Esperanto alportas la saman praktikan utilon, kiun prezentas la multe pli malfacila ellernado de aliaj vivantaj lingvoj ĉe la akirado de bone salajrataj postenoj, la bildo de la Esperanto-movado tuj aliĝus; tial ke ni eĉ ne bezonus propagandi, ĉar oni nin serĉus, por povu lerni la lingvon.

La almontrito al la ĉirkaŭstanco, ke multnombraj komercaj ĉambroj, foiroj, firmaoj, industriaj entreprenoj enkondukis „oficiale“ Esperanton kaj ke ĉi tiu aŭ tiu instruad-ministerio eldonis favoran dekreton, ne havas la esperitan sukceson, ĉar en la publika vivo oni nenion rimarkas pri tio, kaj ofte tiuj ĉi „sukcesoj“ estas nur paperaĵoj. La publiko estas tia, ke ĝi nepre volas vidi realaĵojn. Tiam kaj tiam oni uzas la internacian lingvon oficiale, sed ĉi tiu ankoraŭ la ĝenerala uzado en la praktika vivo, kaj nur per tiu oni konvinkos la homojn. La ĝenerala enkonduko okazos nur tiam, kiam la granda amaso postulos ĝin. Sed la granda amaso de la publiko ĝin nur postulos, kiam la lingvo estos enradikiĝinta en la amaso.

Tiamaniere la Esperanto-afero evoluis je problemoj, kies solvo fariĝas ju pli longa, des pli malfacila. Sed unu estas klara: Por ke Esperanto enradikiĝu en la amaso, ni nepre bezonas larĝan bazon. Tiun nur povas doni la lernejo.

Ekkoninte tiam ĉi necesojn, ni jam delonge estas klopodantaj instigi la ŝtatajn lernejn estrarojn por personaj vizitoj kaj petiskriboj, por ke ili per ordono dekretu la ĝeneralan enkondukon de Esperanto kiel lernfako en la publikaj lernejoj. Sed niaj deputitaroj pli ol unufoje ricevis la respondon, ke la instruad-ministerio ne povas dekreti de supre la ĝeneralan enkondukon, sed ke ĝi nur cedos al la fakta bezono, kiu devas veni de malsupre, t. e. kiam la amaso ĝin postulos. Por ke tio okazu, ni devas ekiri novan vojon:

*) En Ĉeĥoslovakio ekzemple jam ofte okazis, ke dekreto, favora al la enkonduko de Esperanto en la lernejojn, kiun unu ministro eldonis, estis nuligata de la sekvanta ministro, ktp.



Redaktejo de „Esperanto“, oficiala organo de UEA.

Por akiri la lernejon, kiu sola povas doni la larĝan bazon, sur kiu Esperanto povos enpenetri en la amasojn, ni devas aniaŭe akiri la instruistaron. Mi estas firme konvinkita, ke tio estas la ununura irebla vojo.

Plej bone ni akiras la instruistojn por nia afero, se ni havigas al ni de la komitato de la distrikta instruista unuigo la permeson fari en plena aŭ ĉefa kunveno paroladon pri la temo „Esperanto kaj Lernejo“. Plej facile oni atingas tiun ĉi permeson per vizito ĉe la esro de la instruista unuigo, por detale informi lin pri la tuta afero.

Mi en mia teritorio jam faris komencon kaj havis grandan sukceson, kiun mi eĉ ne atendis. Mi faris tiun ĉi varboparoladon en la najbara urbo Brŭx.

Por montri al la ĉeestantoj la praktikan uzadon de la lingvo (tre grave!), mi kunveturigis el Saaz ankoraŭ kvar bone Esperanto-parolantajn sinjorojn kaj faris samtempe en la sama ĉambrego malgrandan ekspozicion de ĉ. 60 diversaj fremdlandaj Esp. gazetoj, kiu vekis viglan intereson. Ke mia parolado efektis en la dezirita direkto, tion mi povis konkludi el la ĉirkaŭstanco, ke la kunprenitaj lernolibroj (ĉ. 40) ne sufiĉis por kontentigi ĉiujn interesulojn. Poste mi eksciis, ke multaj el la ĉeestantoj, precipe la pli junaj, nun lernas Esperanton. Je mia peto mi ricevis de la komitato ateston pri mia parolado kun aldonita rekomendo al aliaj instruistaj unuigoj (okf. je multobliĝite), kiun mi volas uzi ĉe paroladoj en aliaj instruistaj unuigoj.

Tiu ĉi nova propaganda maniero devas esti organizata de niaj Esperantaj landligoj. La landligo destinu en ĉiu distrikto aŭ pli granda teritorio unu aŭ du instruistojn aŭ profesorojn, kiuj entreprenu en la ĉiita maniero la necesajn paŝojn por interesigi la instruistaron al la lernado de la lingvo. Ĉe ni en Ĉeĥoslovakio ofte jam sufiĉas la almontrito al la ekzamen-komisionoj por Esperanto, kiujn la ŝtato starigis en la pasinta jaro en Praha kaj Brŭx.

„Ne el mia buŝo eliras ĝi,“ ridete respondis mia akompananto. „Ĝi estas resono de viaj surteraj kanonoj. Ĉiu ‚bummo‘ anoncas en nian mondon la alvenon de nova aro da surteranoj.“

„Bummbummi!“

„Ĉu ĉi tiu ‚bummvagonaro‘ tute ne ripozas?“

„Ĝi laboras tage kaj nokte. Nia Postmondestro diras, ke, se ĉi tiu terura amaso da alvenantaj anoj ne ĉesigos, la Postmondo diskrevos...“

„Bimmi!“

„Kaj kion signifas la — ‚bimmi‘?“

„Ĝi estas resono de la plej novaj surteraj morim-sinoj, kiuj per unu ekpaŝo Postmondon gas ne certon, sed miron da patriotoj.“

„Bummbimmi! bimmbummi!“

„Terura bimmbumvagonaro...“ ekpensis mi tim me, rifugante malantaŭ mia kondukanto.

Fine ni aŭvenis. Okaze de mia alveno oni aranĝis specialan kunsidon. Antaŭ miaj okuloj foraperadis multaj miaj konatuloj. Ĉiuj sidigis ĉe unu granda verda tavolo. Pokalestro plenigis niajn pukalojn per iu verdora nektaro. Prezidanto honoris min per solena alparolo.

Kiam mi englutis mian nektaron, ekŝajnis al mi, ke en miajn vejnojn eniĝis iu nova vivo, kaj en mian kuran — novaj sentoj. Mi fariĝis flugifacila.

„Ĉu vi ofte trinkas ĉi tiun likvoron?“ demandis mi mian ĉetabian najbaron, kiu havis grandan verdan sielon sur la kopo.

„Speciale por gastoj oni faras escepton — ili ricevas po du pukalojn.“

„Kara amiko... bonvolu...“ diris mi, alŝovante mian pukalon.

Kaj forgluitinte la duan porcion mi ekparolis:



Administrejo de UEA.

Ĉe la varboparolado oni ĉiam akcentu la ĉirkaŭstanco, ke la lernantoj nur ĉe la Esperanto-instruado estas daŭre devigataj ĉiun vorton esplori laŭ ĝia senco por enpenetri en la sencan de la ideo.

Tuj kiam ekzistos pli granda nombro da instruistoj, kiuj scipovas la internacian lingvon, la landligo de la instruistoj mem povas postuli de la instruad ministerio la ĝeneralan enkondukon de Esperanto kiel lernfako en la lernplanon.

Rimarkigo: Por plifaciligi al la kolegoj-propagandistoj la laboron, mi tradukis mian en Brŭx faritan paroladon, per kiu mi havis tiom da sukceso, Esperantilingven. Nun ĝi estas presata, kaj mi esperas, ke ĝi aperos en iu semajno. Kiam ĝi estos aĉetebla, mi anoncos ĝin en ET inter „Anoncetoj“. Ĉar nur proporcio malgranda parto de la varboparolado rilatas la specialan temon „Lernejo“, oni povos profite uzi mian paroladon kiel modelon de ĝenerala varboparolado. Por tiu ĉi kazo mi faros kelkajn aldonojn.

Fotografio.

Internacia Ekspozicio de Fotograf-Arto en Antverpeno (Belgiando).

► Dum la monato aŭgusto 1922, la Reĝa Societo de Fotografaj kaj Sciencaj Studoj de Antverpeno organizas tiun internacian ekspozicion, en kiu partopreni ĝi invitas precipe ne-profesiajn fotograf-amantojn de la tuta mondo. Oni petu la regularon en Esperanto de la ĉiita societo. Adreso: Poŝta Kesto 763, Antverpeno. La Esperantistaj delegitoj kaj grupoj estas petataj konigi tiun informon per la lokaj fakaj gazetoj kaj asocioj. La Esp. gazetoj bonvolu represli.

Lernejo.

Nova pedagogia revuo.

Pedagogia Instituto de Comenius ĉe la ministerio por lernejoj kaj nacia kulturo de Ĉeĥoslovaka Respubliko en Praha intencas fondi pedagogian revuon, parte organon de la Instituto

kaj parte revuon sciencan kaj informan. Ĝia enhavo estos presata en angla lingvo kaj ĉiujn alilingvajn kunlaborojn la redakcia rondo tradukos en anglan lingvon. La redakcio tre ŝatos Esperantajn originalojn pritraktantajn la enkondukon de Esperanto en la lernejo, la graveco de internacia lingvo por la edukado kaj internaciaj rilatoj. Koncerne la pedagogion kaj lerneferojn la Revuo volas esti precipe ligito inter la nacioj de Magranda Ligo (Entente) kaj la okcident-eŭropaj landoj. Por tiu celo la urbo Praha, lokita meze de Eŭropo, estas tre taŭga.

La Pedagogia Instituto aŭvokas ĉiujn, kiuj laboras por la lerneferoj ĉu ĝenerale ĉu fako, por la pedagogio aŭ pedopsikologio, korpa eduko aŭ spirita, ke ili interrilatigu kun la nomita Instituto.

Ĉiujn demandojn, manuskriptojn kaj informojn direktu al „Pedagogický ústav Komenského“, Praha III, Letenská 5, Ĉeĥoslovakio.

Esperanto en superaj popularaj lernejoj de Verviers (Belg.)

Dank' al la klopodoj de nia malnova samideano Jos. Pirnay, urba konsilanto, Esperanto estas enskribita kiel nedeviga fako en la programon de kvargradej (superaj popularaj) lernejoj de la belga urbo Verviers. S-o Spinbayer, eksurbestro, honora prez. de la loka Esp. grupo kaj honora membro de Belga Ligo Esperantista, jam donacis sumon de 100 fl., por ebliĝi al unu el la lernantoj de tiuj ĉi lernejoj la viziton al la proksima belga Esp. kongreso.

Komerco.

El la Pariza Komerca Ĉambro.

La 11. jan. okazis en la Pariza Komerca Ĉambro, sub la prezido de la ministro de komerco, Dior, elekto de nova prezidanto kaj membroj. La vic-prez. s-o Roget estis elektata prezidanto. La eksiganta prezidanto, s-o Pascalis, granda amiko de Esperanto, en sia parolado pri la instruata programo de komercaj lernejoj laŭde parolis pri Esperanto kaj pri ĝia neceso en la komerco.

Recenzejo.

Libroj.

POŝKALENDARETO por Esperantistoj. 1922. 64 pĝ. 7/12. ĉ. E. doneloj Friedr. Ellersiek, Berlin S. 89, Wissmannstr. 46. Prezo 5 gmk, por bonvalutaj landoj 4,80 gmk.

La poŝkalendareto estas tre praktika, enhavante — krom la kalendaraĵoj — multajn sciindaĵojn pri la historio de Esperanto, la Esp. organizoj, portretoj de D-ro Zamenhof, la himno, ktp.

KARLO. De Edmond Privat. 11: 16 cm. 48 pĝ. kaj kovrilo. Eldonis Esperanto-Verlag Berlin S. 89. Prezo 5 gmk. (por bonvalutaj landoj 7,80 gmk.)

Ju pli granda la verko ju pli grava ties enhavo, des pli ĝi konatiĝos, des pli ĝi estos ŝatata. Ekzistas ankaŭ trezoroj, kiuj longan tempon restas kaŝitaj, tamen ne malpli estas valoraj ol la grandaj lernejoj brilantaj en artefarita lumo. Inter ili estas „Karlo“, laŭ diro de l' verkisto mem „facila legolibro por la lernado de Esperanto“. La bona stilo, simpla kiel eble tiu de Kabe en „Unua legolibro“ helpas la verkon plenumi sian taskon. Antaŭparolo pri la uzado de la libro ĝin plivalorigas. Ne plaĉas al mi — sed tio estas negrava — ofta uzado de „afero“ anstataŭ „objekto“ kaj de „profesoro“ anstataŭ „instruisto“. (H. H.)

KURSA LERNOLIBRO. De Edmond Privat. 11: 16 cm. 80 pĝ. kaj kovrilo. Eldonis Esperanto-Verlag Berlin S. 89, 1922. Prezo 9 gmk. (por bonvalutaj landoj 13,50 gmk.) Precipe mi ŝatas ĉe tiu ĉi libro, ke ĝi celas paroli la lernanton konstante nur malmulte da vortoj. Tiel jam en la unua leciono li ĝojos pri la lingvo kaj ne eniĝos pri la vortoj, kiujn aliaj lernolibroj altrudas al li. Ĝi post l'om kreas la idearon, pri kiu li lernas paroli, fakte preskaŭ ne devigante lerni vortojn. En simplaj frazoj uzante gramatikajn regulojn oni same evitas lerni ilin, kiel la ankaŭ multaj personoj uzas bonan gepatran lingvon, nenion sciante pri gramatiko. Por rapidaj kursoj la libro ne taŭgas, sed des pli bone por instruado al personoj, kiuj ne emas lerni parkere. Ĉerte ili, instruistoj laŭ la kursa lernolibro, lernas bonan lingvon en rilate mallonga tempo, kvankam la libro ampleksas 80 lecionojn kaj tial postulas ĝenerale unu jaron. Lerta instruanto povas instrui laŭ ĝi neniam uzante gepatran lingvon, granda prefero, kiun permesas nur tre malmultaj libroj. (H. H.)

El Postmondo.

Malfruiginta raporto de en la jaro 1917 speciale sendita kaj nun feliĉe reveninta delegito de UEA.

Mi bone ne memoras: ĉu kuglo aŭ io alia suprenflitis min en aeron, kaj mi komencis flugi en ĝia senfinaĵo, ĝis mi atingis iun pordegon, antaŭ kiu gardestaris iu armita grandegulo.

„Sigirafoik?“ demandis li min tubavoĉe en iu nekonsata lingvo. Ĉar mi ne komprenis lian demandon, mi timeme montris mian UEA-steleton.

„Bonvenu, sinjoro, mi petas... vi staras antaŭ la sankta Pordego de la Postmondo, aŭ alle — Pacmondo“, ekparolis li Esperante.

„Mi tre ĝojas... ĉu mi povas eniri?“

„Se vi havas ĉiujn viajn dokumentojn en plena ordo.“

„Jes... jen ili estas: naskiĝatesto, sanatesto, senpedikiĝatesto, vojaĝa karto, pasporto, pano-karto, buterokarto, terpomokarto, laktokarto, ĉokoladokarto, sukerokarto, aero...“

„Sufiĉe... sufiĉe sinjoro!“

Kaj jen, plena de misteraj sentoj, mi trapasis la sojlon de tiu sankta regno. Tuj post mia ekapero kaptis min afable kelkaj miaj konataj „geesperantistoj“ (anoj de „unu granda rondo familia“). Gaje babilante ili kondukis min al sia hejmo.

„Bummi... Ni havas ĉi tie propran grupon Esperantistojn. Rakontu al mi, kara gastoj, ion el via terpeka vivo.“

„Tre volonte... sed mi iomete laciĝis de l' eskerordinara vojaĝo.“

„Bummi! Ni tuj ripozas en nia rondo.“

„?! mi tute ne komprenas vian ‚bummon‘! Ĉu ĝi estas via postmondana pseŭdonimo, aŭ iu — neologismo?“



Parto el la Biblioteko de UEA.

La facileco de Esperanto.

... Parolante tre malmulte kaj tre malbone la anglan lingvon kaj, ĉiuokaze, nekapabla skribi ĝin, mi konatiĝis ĉi tiun someron kun afabla angla industriisto, kiu konis apenaŭ kelkajn vortojn france. Neeble kompreniĝi. Mi venigis vortaron kaj gramatikon Esperanto-anglan kaj instruis al li la gramatikon promenantante. — De la monato aŭgusto, ni interŝanĝis ses leterojn en Esperanto, kaj ni kompreniĝas perfekte.

A. Baudet,

membro de la Pariza Komercia Ĉambro
(„Oficiala kodo de I. L. por la komercio“
en „L'Exportateur Français“, 2. 1. 22.)

Mallongaj Esp. Sciigoj.

Franclando.

En Saint-Denis (apud Paris) s-o A. Germaine, instruisto, gvidas kurson por gekomencantoj en ejo de la lernejo Corbillion kun 35 lernantoj. Alia kurso gvidota de s-o Jourdans kaj Grisel kun 30 lernantoj komenciĝos.

En Le Havre ĉiutage kurso de la laborista grupo en „Cirklo Franklin“.

En Sotteville-lez-Rouen kurso kun 20 lernantoj.

Nederlando.

En la Popola Universitato de Rotterdam s-ino Isbrücker gvidos kurson, jam en 1920 ŝi gvidis tie komencan kaj en 1921 daŭrigan kursojn. — En decembro okazis en Hagoo propaganda fest-vespero partoprenata de 350 personoj; oni prezentis interalie duaktan komedion de f-ino N. Boon „Vader kent z'n Fransch“ (Patro parolas la francan lingvon); laŭdantaĵ kritikoj en la gazetoj.

En la nederlanda gazetaro aperis dum 1921 ĉ. 600 artikoloj, artikoletoj kaj sciigoj pri la Esperanta movado; ĉiunonate f-ino Boon, al kiu la enpresitaj estis senditaj, raportis pri tio en „Holanda Pioniro“.

La ministro de instruado de Nederlando

petis s-on Sevenhuysen, reprezentin lin en la konferenco de Esperantistaj instruistoj en Genève.

La Senlingvulo.

Rakonto de Vladimir Korolenko.

Rekomendita de Esperantista Literatura Asocio.

Tradukis laŭ la 5-a rusa eldono kun permeso de la aŭtoro
Maria Ŝidlovskaja.

(80-a daŭrigo.)

„Li mensogas,“ kriis Mateo, „ne fidu al la malnobla kanajo...“

Kaj indignigita ĝis la fundo de sia animo pro la kalumnio, li sin jetis al la tablo, por montri al la juĝisto, kion li tie antaŭ la stacidomo intencis fari kun la mano de Kelly.

Juĝisto Dickinson salte levigis kaj hazarde piedpremis sian novan ĉapelon. Iu korpulenta germano, Kelly kaj ankoraŭ kelkaj viroj kaptis Mateon de malantaŭe, por ke li ne mordu la juĝiston elektitan de la loĝantaro de Debltown. En la juĝejo ekregis granda tumulto, neniam tie okazinta, se oni povas kredi al la urbaj kronikoj. La plej proksime staranta sin jetis al la pordo, interpuŝigis, faladis, kriadis, dum interne fariĝis io nekomprenebla, io terurega.

Elturmentita, malsata, ofendita, furiozita, la Loziŝcano forpuŝis ĉiujn lin tenantajn amerikanojn, kaj nur la same kiel li fortega germano, forte fiksite sian piedojn, tenis ankoraŭ de malantaŭe lian kubutojn. Sed Mateo sin ŝiradis antaŭen kun okuloj sangruĝaj, sentante, ke efektive li estas freneziganta, ke efektive li havas la deziron sin jeti kontraŭ tiuj homoj, bati, eble eĉ mordi.

Nefacile estas deveni, kio okazus plue.

Sed en la sama momento en la juĝejon rapide eniris Nilov. Dispuŝante la homamasojn, li aliris al Mateo, haltis antaŭ li kaj en rusa lingvo demandis lin per voko plena de kunsento.

„He, samlandano! Kion do vi ĉi tie faras?“

Ĉe la unuaj sonoj de tiuvoco Mateo sin liberigis kaj, klininte la kapon ĝis la mano de la

Kotizoj al UEA.

Oficialaj prezoj en avisal frankoj: Membro (M) 5 fk., Membro-Abonanto (MA) ricevanta la gazeton „Esperanto“ 12.50 fk., Membro-Subtenanto (MS) ricevanta la gazeton 25 fk., Membro-Dumviva ricevanta la gazeton kaj ĉiujn oficialajn dokumentojn 300 fk. (partopagoj trijaraj po 100 fk., sed neniu naciaj favorprezj).

Naciaj prezoj por M, MA kaj MS por la landoj Aŭstra kr. 200, 600, 1400; Baltaj gmk. 25, 65, 150; Belga fk. 10, 25, 50; Brita ŝil. 5, 12 6, 25; Bulgara levoj 35, 80, 180; Ĉeĥoslovaka kr. 25, 65, 140; Dana kr. 5, 12.50, 25; Finna fmk. 22, 60, 120; Franca fk. 10, 25, 50; Germana gmk. 25, 65, 150; Hispana pes. 6, 15, 30; Hungara kr. 140, 380, 800; Jugoslava kr. 60, 150, 340; Itala lir. 14, 35, 70; Nederlando hfl. 2.80, 7, 14; Norvega kr. 6, 15, 30; Pola pmk. 500, 1500, 4000; Rumana leoj 30, 75, 160; Sveda kr. 4, 10, 20; Usono dol. 1, 2.50, 5.

La Help-Membroj (HM) kategorio provizore kreita favore nur de jenaj landoj kun tre malbona kurzo: Aŭstrio kr. 125, Hungario kr. 90, Pollando pmk. 300. Ili ĝuas ĉiujn rajtojn escepte la ricevon de la jarlibro, gazeto kaj enskribon en la interrilata adresaro.

La Entreprenoj de UEA (komercal firmoj, societoj ktp.) pagas jare la oficialan aŭ nacian prezon kiel la MA. La Entreprenoj rajtas presigi tekston de 40 vortoj en speciala parto de la jarlibro kaj rajtas uzi la servojn de informpedito.

Germanlando.

Koblenz. Kurso inter kriminaloficistoj. La kursoj en proksimaj Vallendar kaj Niederlahnstein bone funkcias.

Saar-Teritorio.

La Esp. grupo Friedrichsthal aranĝis sabate, 14. jan., bone vizititan Esp. ekspozicion kaj balon. Samtempe oni transdonis premiojn al Esperantistoj partoprenintaj en traduka konkurso. (W.D.)

Nia Dekkvina en Italio?

En la decembra numero de „L'Esperanto“ ni legas jenan sciigon:

Lau propono de adv. nob. Filippo Palmeggiani kaj de s-ino prof. Amelia Cocchi el Bologna, en la kunveno de 6. dec. de la Konsilantaro de Emilia Esperanto-Asocio oni metis la fundamentan ŝtonon, por ke la XV-a Internacia Kongreso okazu en Bologna la jaron 1923.

Tiucele la komitatanoj de Emilia Esp. Asocio komisiis delegitan partopreni en la XIV-a Kongreso kaj inviti la tutan Esperantistaron elektita Bologna'n kiel sidejon de la XV-a Universala Kongreso.

Bulgario.

Estas fondita en Sofio Bulgara Korporacio „Esperanta Libro“ kun la celo eldoni instruilojn de Esperanto kaj el bulgara lingvo tradukitaĵojn Esp. verkojn.

La Bulgara Esp. Societo petis oficiale la estraron de la Bulgara sekcio de Ruĝa Kruco, helpi Esperanton konforme al la rezolucio de la X-a Internacia Konferenco de la R. K. Novaj grupoj en Plovdiv, Kjustendil, Gradec, Tirnovo, Gorsko Slivovo.

Konstanfinopolo.

La Esperanto-Asocio nun havas 140 aktivajn membrojn.

Rumanio.

En Timiŝoara estas nuntempe du kursoj kun 70 partoprenantoj (gvidantoj s-anoj Alfredo Bam-bach kaj d-ro Jozefo Nemeth).

Unua tutpola kongreso de Esperantistoj en Varsovio.

Ni jam raportis, ke en Varsovio estas starigita Organiza Komitato por kunvoki unuan tutpolan

novalveninto, komencis ĝin kisi, ploregante kiel infano...

Post kvaronhoro la juĝejon de s-ro Dickinson ree plenigis la loĝantoj de Debltown, kiuj nun jam sciis, ke la intenco de la allandulo klariĝis en la plej kontentiga senco. En la persono de la rusa sinjoro, laboranta en arboseĝejo, Mateo trovis samlandanon kaj advokaton, kiu sen la peno sukcesis refuti la kulpigon. Juĝisto Dickinson ricevis tute kontentigaĵn respondojn je siaj demandoj: — via nomo? — via nacieco? — kaj je ĉiuj ceteraj demandoj, postulataj de la cirkonstancoj. Fiera pro la granda sukceso de siaj esploroj, li grandanime forgesis eĉ pri sia nova ĉapelo kaj, rapide fininte la oficialan parton, etendis la manon al la kulpigito, eldirante la certecon, ke elekto de la urbo Debltown faras grandan honoron al lia prudento. Fine li faris al Mateo neoficialan demandon, kiun Nilov tradukis ruse:

„Kiel plaĉas al vi nia lando, sinjoro?“

Mateo, kiu ĉiam ankoraŭ malfacile spiradis, svingis la manon.

„Ha! La diablo ĝin prenu!“ li ekkriis plensincere.

„Kion diris la sinjoro pri nia lando?“ demandis scivole Dickinson, per sia demando vekante saman scivolemon de ĉiuj ceteraj ĉeestantoj.

„Li diras, ke li bezonas ankoraŭ tempon, por juste taksi ĉiujn bonajn flankojn de via lando, sinjoro!“ diris Nilov.

„Bonega respondo, tute inda je prudenta sinjoro,“ diris Dickinson, nun pleje kontentigita.

XXXI.

La sekvanta tago la gazeto de la urbo Debltown eliris en pligrandigita formato. Sur la unua paĝo troviĝis portreto de sinjoro Mathew, a nova loĝanto de la glora urbo, kaj en la teksto, havanta sufiĉe imponantaj titoloj, la redaktoro

Esperanto-Kongreson, kiu okazos sub protekto de s-ino Klara Zamenhof je Pasko 1922. La kongreson partoprenos rajtigataj delegitoj de ĉiuj en Polujo ekzistantaj Esp. societoj kaj grupoj. Oni celas krei tutpolan Esp. Asocion aŭ Federacion. Informojn donas la sekretariino de la Organiza Komitato, f-ino d-ro Paŭlina Muszkatbat, Warszawa, Krachmalna 15.

Esperanto-Association of California, Inc. havis sian jaran ĉefkunvenon kun bela festo la 15. okt. en San Francisko. Oni atendas aliĝon de la grupo en Los Angeles, kiu rapide kreskas.

Gazetaro.

El Artesano, Barcelona. Jan. 1922. (Artikolo pri la XIII-a de A. Ferrer.)

Neue Lodzer Zeitung, Lodz, Pol. 8. jan. (Esp. angulo.)

Swiat Pracy, Warszawa, 1. jan. (Esp. angulo.)

Measezeitung Reichenberg, 30. dec.

Frankfurter Measezeitung, 7. jan.

L'Alliance Républicain, ĉs., Beauvais, Franc., 5. 1. (Represo de du porasp. artikoloj de „Peitil Parisien“.)

Correio da Manhã, Rio de Janeiro, 14. 12. (La opinio pri Esperanto de s-o Painlevé, membro de la Franca Akademio de Sciencoj.)

Nieuwe Hengelose Courant, Hengelo, Nederl., 14. 1. (Dukolona artikolo pri Esperanto en superaj kaj gimnaziaj lernejoj, de prof. Baart de la Faille el Arnhem.) En la sama gazeto de 7. 1. recenzo pri la kristnaska n-o de ET.

Recenzejo.

Gazetoj.

BULLETIN de la Société Française pour la Propagation de l'Esperanto. N-o 1. Jan. 1922.

„Franca Esperantisto“ ĉesis aperi pro manko de rimedoj. Nun aperas 4-paĝa „Bulletin“ nur en franca lingvo kun propaganda enhavo; aldonita estas 2-paĝa folio en Esperanto. Abono jare 3 fk., eksterlande 5 fk. Adreso: M. Robert, 5 rue de Ravignan, Paris 18. — Espereble la nova bulteno vivos pli longe ol „Franca Esperantisto“ kaj sukcesos plenumi sian duoblan rolon: samtempe esti organo de la franca Esperantistoj kaj malkara propagandilo de la neesperantista publiko.

VERDA AMIKO. Novembro. Eldonita de la Komercal Kolegio en Osaka. Jap.

Nova manuskribita kaj multobligitaj gazeto. ne abonebla.

La Provo. Jan.

Bizantio. Nov.

Kristana Espero. Kristnaska n-o. Kun trikolora titolo.

sinturnis al la tuta Ameriko ĝenerale kaj al la urbo Nov-Jorko speciale. — De nun, li skribis, — la urbo Debltown povas fieriĝi pro la cirkonstanco, ke ĝia juĝisto s-ro Dickinson trafis solvis la demandon, pro kiu vane turmentadis siajn cerbojn la plej bonaj sciencistoj de Nov-Jorko. La fama sovaĝulo, heroo de la Centra Parko, kies historio trairis la tutan Amerikon en tute kripigitaj formoj, nuntempe estas gasto de nia urbo. Post la lertega esploro, farita de tre sperta specialisto en tiaj aferoj s-ro juĝisto Dickinson, la sovaĝulo montriĝis ruĝo, naskita en Loziŝca gubernio (unu el la plej belaj kaj plej altkulturaj de tiu grandega kaj amika regno), kristano kaj, laŭ niaj spertoj, viro tute lolala, mildkora, kun agrablaj manieroj: Li aperigis vere kristanan ĝojon, kiam li eksciis, ke la farto de policano Hopkins, kiun oni opiniis mortigita, estas en bonega stato, tiel ke tiu policano jam povis reveni al la plenumado de sia ofico. Tiom pli bone por s-ro Hopkins! Sed — ni kuraĝas aldoni, ripetante la opinion de la plej bonaj juristoj de nia urbo, — ĉi tiu demando povas interesi nur s-ron Hopkins mem, ĉar li mem estas kulpita pri sia malfeliĉo. Jes, ni ripetos, li mem estas kulpita, ĉar li la unua frapis per bastono la kapon de la pacanima allandulo, kiu sin turnis al li kun signoj de amo kaj konflikto. Se la juĝistoj de Nov-Jorko havas alian opinion, se iu advokato de ilia ŝtato deziras insisti pri la mala aserto, aŭ se eble policano Hopkins intencas postuli repagon de siaj perdoj, ili havos aferon kun la plej bonaj juristoj de Debltown, pretaj defendi la kulpigitan allandulon senpage. Tamen ni dubas, ke tio estos necesa, post kiam ni senuvaligos sur la paĝoj de nia gazeto ankoraŭ unu kalumnion, per kiu niaj Nov-Jorkaj samprofesuloj, sen sufiĉa ekzameno de la faktaj, makulis la reputacion de s-ro Mathew Lozinski, nia nuna estimata gasto kaj, espereble, nia estonta samurbano. Ni defini-

Ĉeĥoslovaka Gazeto. Dec.
Nova Tagigo. Dec.
La Esperantisto. Nov.-dec.
Espero Teozofia. Nov.-dec. N-o 2. Red.: V. Cimr, Praha II.
Krakovska ul. 17.
Nova revueto pri teozofio, kies 1-an numeron ni ne ricevis.
La Revuo Orienta. Nov.
Der Arbeiter-Esperantist. Jan.
Esperantista Junularo. Nov.-Jan.
Progreso. Dec.
Kalifornia Folieto. Okt.-dec.
Junula Voĉo. Jan.
Verda Utopio. Nov.
Amerika Esperantisto. Dec.
Bulgara Esperantisto. Dec.
The British Esperantist. Jan.
La Holanda Pioniro. Dec.
Suisian Idisto. Jan.

Parolejo.

109. Pensoj pri la Sudgermana Esperanto-Kongreso en Salzburg, 25.-26. marto (?) 1922.

Ĉu tiu kongreso estas necesa?

Ne pre, ĉar la suda parto de Germanlando estas ankoraŭ malluma regiono rilate al Esperanto kaj Esperantismo — do urĝas unueca kaj per ilo efika agado.

Ne pre, ĉar la sudgermanaj Esperantistoj bezonas favoran okazon por konatiĝi kiel eble plej multe unu kun la alia kaj por aŭdi kaj paroli nian karan lingvon kiel necesan ekzercadon por gajniga ĉeesto en pli grandaj kongresoj.

Ne pre, ĉar ni sudgermanoj bezonas pli viglan interkomunikon pri propaganda maniero kaj pli disvastigitan uzadon praktikan de Esperanto laŭ la modelo de UEA.

Kiel en Salzburg?

Ĉar allogas la fama beleco de ĉi tiu urbo, same kiel la malalta valuto aŭstra, same kiel la sana nacia sento al niaj samideanoj trans la limpallaoj.

Ĉu dum la 25-a kaj 26-a de marto?

Mi persone proponas pli favoran tempon, eble la Paŝkan dimanĉon kaj Paŝkan lundon mem, do la 16-an kaj 17-an de aprilo.

Pri tio kaj pri proponoj al la programo vigla opini-interŝanĝo estas dezirinda. Mi alvokas la tutan sudgermanan Esperantistaron partopreni la kongreson en Salzburg. Oni postulu aliĝilojn! Tuj! (Adreso: Salzburg, Münchsberg 5. Ferd. Peter Huber.)

(Karl Leitl, del. UEA, Otting, poŝto Waging, Oberbayern.)

Korekto.

En n-o 64 („Posttagmezo en Paradizo“, lasta kolono, linio 20) oni bonvolu legi „spiritele“ anstataŭ „spiriretene“. En n-o 67 en la artikolo pri Vladimir Korolenko sur paĝo 2 bonvolu korekti, ke Korolenko mortis la 25-an de decembro 1921 (ne 1911).

Afranko grave altiĝis

la 1-an de januaro en diversaj landoj. En aliaj landoj ĝi estas altega jam delonge. Do estas la devo de ĉiu demandanto, egale ĉu li skribas al redakcio de Esperanta gazeto, al delegito de UEA aŭ al iu internacia aŭ nacia Esperanta organizaĵo aŭ insituito, ke li ĉiam nepre almetu monbileton aŭ respond-kuponon por la poŝtelspezoj de la respondonto. Alie neniu rajtas postuli respondon. — Plua devo de ĉiu skribanto estas zorgi atenti la novajn tarifojn. Kiu ne afrankas sufiĉe sian leteron, poŝtkarton aŭ alian sendaĵon, devigas per tio la ricevonton al nemeritita punpago, kiu ĝenerale estas minimume la duoblo de la kuitma tarifo. La redakcio de ET preskaŭ ĉiutage ricevas tiajn nesufiĉe afrankitaĵajn sendaĵojn. Estonte ĝi ne plu povos akcepti ilin. Do oni bonvolu atenti!

tive certiĝis, ke li tute ne mordaŝ! La gesto, kiun policano Hopkins klarigis al si en tia hontinda senco (kiu ne tute bone rekomendas la spirit-econ de la Nov-Jorka polico!), havis kontraŭe la signifon de varmega saluto kaj atestimo; iliaj gestoj en la Loziŝca gubernio estas uzataj por reciprokaj rilatoj inter homoj de la plej alta socia rango. Li sin klinis nur por kisi la manon de s-ro Hopkins. La saman geston ni havis la okazon vidi, uzitan de li rilate la juĝiston Dickinson, la policanon Kelly kaj ankoraŭ unu el siaj samlandanoj, kiu nun okupas modestan oficon en la arboseĝejo de s-ro Dickinson, sed al kiu liaj talentoj kaj lia instruiteco sendube malfermos en nia lando larĝan vojon. Se en Debltown tia elmontro de la plej alta delikateco ankaŭ sekvigus maldelikatan respondon per bastonfrapo sur la kapon, certe nian policanon trafus la maldolĉa sorto de la policano de Nov-Jorko, ĉar la rusa sinjoro posedas neordinaran korpan forton. Sed Debltown — ni flere tion diras — ne nur solvis la etnografian problemon, kiu superis la fortojn de la fanfarona Nov-Jorko, sed ankaŭ donis al la suprenomita urbo ekzemplon de vere kristana konduto rilate allandulojn, konduto, kiu espereble sukcesos forviŝi el la animo de nia gasto la malgajajn rememorojn pri la tempo, pasigita en Nov-Jorko.

S-ro Nilov, la nomita rusa sinjoro, kiu konatiĝis kun s-ro Lozinski en la juĝejo de s-ro Dickinson, invitis sian samlandanon en sian loĝejon, kiun li havas en malgranda vilaĝo apud la arboseĝejo. Sufiĉe granda parto de la loĝantaro de Debltown, konsistanta plejparte el junaj sinjoroj kaj sinjorinoj, akompanis ilin ĝis la domo kun aprobaj aklamoj, kaj eĉ post kiam la dompordo estis fermata, la homamaso ne disigis, ĝis fine s-ro Nilov eliris kaj faris mallongan paroladon pri la estonta florado de nia glora urbo.

(Daŭrigota.)

Tre utilaj Propagandiloj

precipe por Esperantistoj de franclingvaj landoj.

Jus aperis:

Prof. Aymonier. La dérivation comparée dans les langues naturelles et artificielles — grava lingva komparo de Esperanto kaj Ido	5.—
Léon Agourtine. L'Esperanto et la lutte des langues (artikolo aperinta en „La Revue Contemporaine“, nov. 1921) — tre aktuala	0.50
L'Esperanto et les Associations Internationales — stenografita raporto pri la kongreso de Internaciaj Asocioj en Bruxelles en 1920	2.—
Antaŭmilitaj kaj dumilitaj verkoj de Prof. Aymonier:	
Une langue vivante artificielle — komentarioj de Esperanto kun ekzemploj	2.25
Réponse à des critiques (artikolo en „La Revue du Mois“) — pri Ido	0.50
Autour de l'Esperanto — lingva defendo kontraŭ reformoj	1.—
Pri Esperanto — la sama verko, tradukita Esperante de s-o Ferter	1.—
L'Histoire d'une Délégation — la vero pri la Delegitaro kun dokumentoj	1.—
Conférence contradictoire à la Bourse du Travail en 1912	0.50
Lazaro-Ludoviko Zamenhof — biografio, franca kaj Esperanta	0.60
Rektoro Boirac. Le Congrès de Genève (el „La Revue Pédagogique“)	0.40

Bonvolu aldoni al la antaŭpagata mendo 10 % por sendelspezoj kaj sendi ĉiujn mendojn al:

ESPERANTISTA CENTRA OFICEJO, 81, RUE DE CLICHY, PARIS 9.

Le problème de langue internationale (el la sama revuo)	0.40
Prof. Bourlet. Conférence faite aux élèves de l'École Supérieure de la Marine — propaganda parolado en la Supera Mara Lernejo	0.75
Barton Kent. Une langue commerciale commune — parolado en Londona Komerca Ĉambro, traduko de Grosjean-Maupin kaj Sayer	0.60
Kontrakto de la Ligo de Nacioj — france, angle, Esperante	3.—
D-ro Cuisnier. De l'Esperanto — argumentplena propagandilo	0.40
G. Chavet. Pourquoi les postiers doivent apprendre l'Esperanto — por poŝtistoj	0.60
Baronino de Ménil. La monduma virino kaj la infano de popolo — france kaj Esperante, luksa eldono kun ilustraĵoj	1.—
Generalo Sebert. La langue auxiliaire internationale	0.40
Barono de Ménil. Les préjugés contre l'Esperanto — tre trafa	1.—
Muffang, Prof. Langue Internationale. Point de vue national	0.50
Kapitano Bayol. L'Esperanto et la Croix-Rouge, kun milita vortaro	2.—
2. Congrès Universel de l'Esperanto — artikoloj de la franca gazetaro	0.25
3. Congrès Universel de l'Esperanto — artikoloj el la angla gazetaro	0.50
L'Échec de la Délégation — du kajeroj de nekonataj oficialaj protestoj kontraŭ la Delegitaro, tre gravaj dokumentoj	2.80

Malofta okazo! Malkara vendo!

Por 100 germ. mk., 3 sviz. fk., 3/2 ŝil. aŭ egalvaloro

en naclaj monbiletoj, sendebaj per ĉeko aŭ en rekomendita letero:

100 belajn kolorajn ilustr. poŝtkartojn

de hungaraj artpentristoj aŭ

100 reproduktajn poŝtkartojn

de malnovaj pentraĵoj el la budapesta Muzeo por Belaj Artoj vi ricevas de

Paŭlo Balkanyi, Budapest VI, Hajos utca 15.

Kiam troviĝos sufiĉaj abonantoj, aperos malgranda revuo

La Mondo Politika.

Jara abonkosto 5/6 ŝil., t. e. 14 resp.-kup. Ne sendu monon tuj, sed anoncu vin kiel abonanto. Oni invitas artikolojn nepagotajn. Bonvolu enmeti kuponon, se necesas respondo.

Redaktoro,
4 Princeton St., London W. C. 1.

La Interŝanĝo

Franca kaj Esperanta revuo ilustrita por korespondantoj, interŝanĝoj kaj komercaj interrilatoj aperas sep fojojn jare, estas 32- aŭ 40-paĝa, ne enkalkulante la liston de la aliĝantoj sendatan nur al la abonintoj.

Jara abonprezo: 10 francaj frankoj.
Specimena n-o: 1 franca franko aŭ 4 respond-kuponoj.

A. Bonnefous, Direktoro,

Béziers (Hérault), Francujo,
3, rue du Capus, et 22, rue Viennet.

Ekspozicio de Lerneja Materialo en Antwerpen (Belgujo).

La Urbestro de Antverpeno decidis organizi baldaŭ ekspozicion de lerneja materialo. Ĉiuj Esperantistaj instruistoj aŭ aliaj fakuloj estas instite petataj, havigi al nia Delegito de UEA, s-o Frans Schoofs, 45 Kleine Beerstraat, Antwerpen, ĉiujn utilajn aŭ interesajn informojn (fotografajojn, desegnaĵojn, katalogojn aŭ adresojn de fakaj firmoj ktp.)



Kopilbroj de Günter

por skribado kun aĥato aŭ krakono por ĉiuj celoj.
Eksperto al ĉiuj landoj.
Kapablaj reprezentantoj serĉataj.
Emil Günter,
Freiburg i. Br. (Germ.),
Schillerstr. 54.
Fabriko de kopilbroj.

Eksporto. Eksporto.

Kiel specialaĵoj estas ofertataj je fabrikprezoj:

Aluminaj Kuirilaroj
Emajlajoj
Zinkumitaj Kuirilaroj
Ŝtalajoj, Poŝtranciloj, Manĝilaroj
Raziloj, Razaparatoj
Ilaroj kaj ĉiuspecaj
Agrikulturaj Instrumentoj
Mane forĝitaj Ĉenoj
Fajrujoj por Gaso kaj Karbo.
Plej bonaj kvalitoj.

Prezoj kaj reproduktajoj estas disponeblaj.

Eksporto al ĉiuj landoj.

Kapablaj reprezentantoj serĉataj.

Josef Schweizer, Freiburg i. Br.
Unterlinden (Germanio).

Kongresanoj de Praha kaj interesuloj atentu!

80 belajn fotografajojn de la antaŭkongreso en Dresden kaj kongreso en Praha vi povas ricevi de mi, ankaŭ diapositivojn de la fotografajoj por lumbildoj.

Prezo: por unu fotografajo (poŝtkarta formato) 4 gmk. diapositivo 30 gmk.
Postulu liston kontraŭ respond-kupono.

10 % de la malgranda profito por

„Esperanta Ligilo“.

Karl Doerfler, Mühlendorf am Inn,
Bayern, Germ.

Korespondantoj, atentu!

Mi povas al vi liveri por via interŝanĝo tre malmultekostajn

belajn vizitkartojn kun via fotografajo.

Prezo por 100 kartoj kun bildo kaj nomo 40 gmk. ĉiu plia linio da teksto 2 mk. pli; sendkostoj 6 mk. 100 poŝtkartoj kun via portreto aŭ la bildo (grupejo) 70 mk. sendkostoj 9 mk.

50 glumarkoj kun via bildo 30 mk.; sendkostoj 4 mk. 100 glumarkoj kun via bildo 40 mk.; sendkostoj 4 mk. Postulu specimenojn! Skribu la pretekston klare, eble duoble. Via fotografajo estos resendata sendifekte. Livertempo minimume 4 semajnoj. Alsendo per rekomendita presajo.

... Dankon pro la liveritaj vizitkartoj; ili estas bonaj, belaj, malmultekostaj. — Teo Jung.
... La belaj kartoj tute kontentige min. Estu certigita, ke mi ne preterlasos rekomendi vin. — M. Butin.

Ferna-Versand, Plauen i. Vogtl., Germ.

Abonejoj de ET

en la landoj

Aŭstra: Ferd. P. Huber, Mönchsberg 5, Salzburg.
Belga: Frans Schoofs, 45, Kl. Beerstraat, Antwerpen.
Bulgara: Georgi Ĥr. Gaŝevski, Bul. Marie Luiza 46, Sofia.
Ĉeĥoslovaka: Otto Sklenčka, Hradec Králové. Otto Lumpe, Trautenau.
Estonia: Est. Esp. Unuiĝo, postkast 6, Tallinn.
Finna: O/Y. Movado A/B., Kasarminkatu 20, Helsinki.
Franca: Esp. Centra Librojo, 51 rue de Clichy, Paris 9.
Hispana: Konrado Doménech, Geron, Rambla Alvarez 12-2.
Hungara: Paŭlo Balkanyi, Hajos-utca 15-II-2, Budapeŝt VI.
Japana: Morizo Ga, 16-V, Kitamači, Aojama, Tokio.
Litova: Paŭlo v. Medem, Smelnu g-ve 12, Kaunas (Kovno).
Pola: Adolfo Oberroiman, Krak-Przedm. 10, Warszawa. (P. K. O. n-o 3125). — Pola Esp. Servo (Fr. Prengel), Kordeckiego 1a, Bydgoszcz-Bromberg.
Rumana: Esperanto-Oficejo Cluj.
Sveda: Förlagsföreningen Esperanto, u. p. a., Stockholm 1. U. S. A.: The Esperanto Service Corporation, 500 Fifth Avenue, New York City.

Fondiĝis en Varsovio
Esperanta Oficejo,

kiu celas havigi al la Esperanto-societoj necesan Esperantan materialon. Ĝi vendas diversajn librojn, stelojn, poŝtkartojn kaj aliajn objektojn. — La Oficejo nun akiris la sekvantajn librojn de famaj Esp. aŭtoroj, kiel Zamenhof, Grabowski, Kabe ktp.:

La Neĝo.
Mia Liro.
Tri Noveloj.
Consilium Facultatis.
Aŭtunaĵo Agordo.
Historiozoŝo de Lingvo Internacia
En Fumelo de Opto.
Nova Antologio
Mia Poŝthorloĝo.
Al Mokantoj.
Pekoj de l' infaneco.
La Lastaj Tagoj de D-ro Zamenhof.
Pax.
Sinjoro Tadeo.
Antaŭen kun Kredoj, kaj multaj aliaj.

Firmo „Renoma“, Varsovio, Pol.
Marszałkowska 91 (posed. M. Klein).

La nova „Otto“ aperinta!

Esperanto-lernolibro, nove prilaborita, kun vortaro.

De Guido Otto, direktanto de la Esperanto-lernejo Plauen i. V., Goethestr. 105.

15—30 000. — Prezo 12 germ. mk.

Eldonejo: Fr. Ellersiek, Berlin S. 59.

„Grandan ĝojon kuzis al mi via eminenta kaj pilbonigita verko. Mi tuj uzos ĝin!“ D-ro S.

„Vi povas esti certa, ke mi nenikaze estus studenta vian libron tiom zorgi, se mi ne opinius ĝin unu el miaj plej bonaj germanaj instrulibroj de Esperanto —“ W. L.

Anoncetoj.

NOVIJARAN BONDEZIRON sendas al siaj korespondanto Lino Hicovich, Trieste, V. Carducci 56, II.

REDAKCIJO DE ESPERANTAĴ GAZETOJ, verkistoj de Esp. libroj kaj propagandiloj estas petataj sendi siajn publikajojn al redakcio de „Esperantysky Zpravodaj“, Praha II, — 2052, Ĉeĥoslovakio (ĉeĥa poresperanta informilo), kiu rekomendos lin al sia legataro. Laŭplaĉe interŝanĝo de la gazeto! Senpaga publikigo de adresoj!

PETO. Malriĉa samideano petas insiste monhavantajn bonfarulojn ebligi al li la vizitadon de la XIV-a kongreso per subtenoj por la vojaĝkostoj. Tiucelajn donacojn oni bonvolu sendi al Ferd. Peter Huber, Salzburg, Mönchsberg 5, Aŭstrio, kiu bilancoŝ ĉion ricevaton aŭ en gazetoj aŭ dum la kongreso. Sinceran dankon jam antaŭe.

ANTVERPENO (Belgujo). — PENSIONO POR JUNULOJ. — Profesoro de Stata Mezgrada Instruado akceptas junulojn 10-18-jarajn, kiuj deziras studi ĉe Mezgrada lernejo, Aĥenée (Liceo), aŭ Supera Komerca Instituto. Vasta moderna domo kun elektra lumo kaj banejo. Famalia vivo. Regula kontrolado pri la studado. Moderaj prezoj. — E. Vincent, Cuperussireto 17, Antwerpen.

FILATELISTOJ. Kontraŭ du svizaj frankoj aŭ samvaloro mi sendas rekomendite 60 malsamajn neuzitajn poŝtkartojn de Meza Litovio. Prezareto kontraŭ unu respond-kupono. S-o W. Kwieciński, str. Zelazna Chaika 50, Wilno, Meza Litovio.

EKSPOZICIO. La varsovia rondo „Konkordo“ aranĝos en la unuaj tagoj de februaro grandan Esp. ekspozicion. Por riĉigi la ekspozicion, oni petas samideanojn alsendi, se eble, gvidlibrojn, vidajkartojn, presajojn ktp. laŭ adreso: Adolfo Oberroiman, Varsovio, Krak-Przedm. 10.

ATENTU! Estimataj redaktoroj kaj eldonistoj en ĉiuj landoj! Mi ne intencas vin ekspluati. La alvokoj estas oftaj sed atentu la mian! Bonvolu sendi al mi po unu ekzempl. de ĉiuj Esp. gazetoj, libroj ktp. por la migranta ekspozicio en Estonio, insisie mi petas malaltigi la prezojn de l' sendaĵoj el bonvalutaj landoj. Rekompence vi ricevos ekzemplerojn de „Esperanto“, „Esp. Triumfonta“, „Esp. Finnlando“ aŭ aliajn gazetojn, aŭ monon.

Sendu katalogojn! Referencoj: Konto ĉe UEA. „Esp. Triumfonta“ kaj „Esp. Finnlando“. — Adreso: Haapsalu, Estonio, J. Orlnihal, pk. 15.

POLAJ ESPERANTISTOJ! Legu „Świat Pracy“, organon de Asocio de Laboristaj Kooperativaj Societoj, kiu publikigas konstantan Esp. kronikon. Ricevebla ĉe Kategoria Robotnicza, Warszawa, Waplna 17.

ET n-ojn 8, 10, 11, 12, 13, 14, 17 kaj 21 deziras aĉeti s-o A. Ferrer, Asturias 44, I, Barcelona, Hisp.

„GVIDLIBRO DE GIRONA“. — Mendo ĝin ĉe la grupo „Girona Espero“, Urbdomo (Cases Consistorials), Girona, Hisp. — Belegaj gravuraĵoj kaj detala arkeologia kaj historia priskribo de la urbo. — Prezo unu peseto aŭ alia egalvalora monsumo.

SENFADENA TELEGRAFADO. Deziras poŝtkartojn aŭ fotografajojn de stacioj por senfadena telegrafado, amatorajn aŭ komercajn. John Ten Eyck Hinkel, 2820, Channing Way, Berkeley, Kalifornio, Usono.

Korespondo kaj Interŝanĝo.

Rudolf Piol, Trautenau, Ĉeĥoslovakio, Pragerstr. 16, interŝanĝas poŝtmarkojn de Ĉeĥoslovakio, Aŭstrio (malnovaj aŭstriaĵaj kaj respublikaj) laŭ katalogo de Michel 1921/22 kun la tuta mondo.

Fraŭlo Aleksandro Ivanov, Tallinn, Estonio, S. Pärnu m 88, deziras interŝanĝi poŝtkartojn ilustr. (bfl.), poŝtmarkojn, monerojn kun ĉiuj la...doj.

F-lo R. Reim, Tallinn, S. Pärnum. 102, Estonio, deziras korespondi per poŝtkartoj ilustr. vidaĵoj (bfl.) kun ĉiulandaj samideanoj.

S-o Frans A. Qvist, Nordingrå, Sved., deziras korespondi kun samideanoj kaj -inoj el ĉiuj landoj per poŝtkartoj, leteroj ktp. Mi tre volonte peras komercaĵojn.

Ervino Toth, Karanšebes, Rumanio, interŝanĝas poŝtmarkojn kun la tuta mondo. Li deziras korespondi per leteroj Esperante kaj tre volonte hungare pri ĉiu temo, prefere pri literaturo (ankaŭ kun fraŭlinoj).

S-o Helmut Klemmer, teknikisto, Glashütte Sa., Germ., deziras korespondi kun samideanoj el ĉiuj landoj per ilustr. poŝtkartoj kaj leteroj.

La lernantoj el la Esp. kurso en Bilbao, Hisp., deziras havi korespondadon kun samideanoj (precipe inoj) de la sekvantaj landoj: Hinda, Ĉina, Afgana, Beluĉistana,

Turkeŝtana, Persa, Indociĥina, Bornea (ins.), Korea, Oceanaj Insuloj, Egipta kaj tuta Afriko, precipe Centra kaj Suda; en Eŭropa nur Islando, Irlando, Norvega, Oreska kaj Dana landoj, en Ameriko nur Kanada kaj Usona landoj. Adreso: Pedro Bilbao, San Francisco 9-1, Grupo Esperantista, Bilbao, Hisp.

Kelkaj samideanoj el Bilbao, Hisp., deziras havi korespondadon kun Azio, Oceanio, Afriko kaj en Ameriko nur Kanada kaj Usono. Adreso: Pedro Bilbao, str. San Francisco 9-1, Bilbao, Hisp.

S-o Francisco Kuttenger deziras korespondi per poŝtkartoj ilustr. kun ĉiulandaj samideanoj. Budapeŝt VII, Istvan ut. 44, fildoz. 4.

S-ino Katerino Kethly deziras korespondi per poŝtkartoj ilustr. (bfl.) kun geoksterlandanoj. Budapeŝt IX, Soroksari ut. 38 1/2.

Budapeŝt. S-o Vilmos Szigeti, V., Nador u. 17-III, Hung., deziras korespondi kaj interŝanĝi poŝtmarkojn kun ĉiuj landoj.

S-o Norbert Fethke, Bydgoszcz, Pol., Torunska 17, deziras korespondi letere kun perfektuloj pri ĉiu ajn temo.

Boris Favorov, Rusio, Peterhof, Peterhovskaja 11, deziras korespondi kaj interŝanĝi poŝtmarkojn kun geesperantistoj de ĉiuj landoj.

S-o Martin Tamverk, Karja 5, Haapsalu, Estonio, deziras interŝanĝi poŝtkartojn ilustr. (bfl.), poŝtmarkojn kaj ilustr. ĵurnalojn en ĉiu lingvo kun ĉiuj landoj.

S-o Franz Mausfeld, Grottau 285, Ĉeĥoslovakio, deziras korespondi per poŝtkartoj ilustr., interŝanĝas poŝtmarkojn kaj monon kun ĉiuj landoj, esceptinte Germanion.

S-o E. Friebel, Instrulisto, del. de UEA, Residenzstr. 24, Dresden-Pobritz, Germanlando, serĉas tutmondajn geokorespondulojn per ilustr. poŝtkartoj (bfl.) kaj leteroj pri ĉiu temo, prefere pedagogia; donas komercajn informojn.

S-o Benjamin Nastelski, Varsovio (Pol.), Graniczna 8, deziras interŝanĝi poŝtkartojn ilustritajn, leterojn kaj poŝtmarkojn; korespondas ankaŭ france.

S-o Bruno Glaubiņ, Oels, Silezio, Wartenbergerstr., Germ., deziras interŝanĝi ilustr. poŝtkartojn, leterojn, fotografajojn kaj monojn kun ĉiuj landoj.

Friř Kaihe, Magdeburg, Fabersir. 12, deziras interŝanĝi poŝtkartojn ilustr. (bfl.) kaj poŝtmarkojn kun ĉiuj landoj.

S-o Oskari Ruohio, Finnlando, Viborgo, K. Erik. L. puistok 11, interŝanĝas poŝtkartojn ilustr. kun ĉiuj landoj.

F-lo Isidro Nalls, str. Union 99, Sabadell, Hisp., deziras korespondi per ilustr. poŝtkartoj.

F-ino Hildegard Hoffmann, liceantino, 17-jara, Oberglauche Kr. Trebnitz, Germ., deziras interŝanĝi ilustr. poŝtkartojn, leterojn, fotografajojn kaj monojn kun ĉiuj landoj.

S-o Chaim Fajn en Jonava, Kauno apsk., Litovio, deziras korespondi kun samideanoj de ĉiuj landoj kaj pri ĉiu temo.

Studentoj de Omska Pedagogia Teknikumo deziras korespondi per poŝtkartoj ilustr. kaj leteroj. Adreso: Kostelnaja 11, por Esperantistoj, Omsk, Siberio.

S-o V. V. Varankin, Niŝni-Novgorod, Rusio, Studenaja 58, deziras korespondi kun ĉiulandanoj.

S-o Henriko Ekslein, Varsovio (Pol.), Leazno 22, deziras korespondi pri diversaj temoj (filozofiaj, literaturaj) kaj interŝanĝi poŝtkartojn kun ĉiulandaj samideanoj. Korespondas ankaŭ france aŭ germane.

Radialegrafistoj, kiuj deziras korespondi kun samfakuloj en Ameriko, sin turnu al s-o J. D. Sayers, Care Evening Post, 20 Vesey Street, New York City, U.S.A.

S-o Vitold Tenisov, Siberio, urbo Barnaul, Pavlovskaja 82, korespondas pri natursciencoj kaj diversaj temoj; kolektas poŝtmarkojn kaj poŝtkartojn ilustritajn.

S-o pastro Ŝeriŝev el Siberio korespondas pri pedagogiaj demandoj kun geinstruistoj kaj gelemantoj el la tuta mondo; interŝanĝas lernejarajn fotojn, albumojn, infanajn kajerojn kaj desegnaĵojn, angla-, franca-, germanlingvajn ilustritajn librojn pri eksterlandeja kaj enlandeja edukado. Adreso: Japanujo, Tokio, Shiba Post-Office; P. O. Box 9. Al Ŝeriŝev.

S-o Petro Sery-Sirik petas komuniki al li laŭ adreso: Siberio, Vladivostok, Dalne-Vostoĉnij Instituto, por s-o Sery-Sirik, la adresojn de patrino kaj fratino de lia edzino Natalio Aleksandrovna; ŝia patrino Natalio Mihajlovna Taube loĝis en 1919 en urbo Verhneudinsk, Barnaula str. 70; ŝia frato Aleksandro Mihajloviĉ Grigorov loĝas en Petrograd, Jamskaja str. 5 kaj havis oficon ĉe Financa Ministerio.

S-o Erich Hoffmann, instruisto, 21-jara, Oels, Silezio, Germ., Blücherstr. 3-1, deziras interŝanĝi ilustr. poŝtkartojn, leterojn, fotografajojn kaj monojn kun ĉiuj landoj.